

# Ora Ĵurnalo

Numero 24, Decembro 2019



***Gazetoj – multaj gazetoj!***

*Al la tuta mondo:*

***Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!***

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

***[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)***

## Enhavo

Enhavo .....	2	Bakom kulisserna då Ora Ĵurnalo produceras .....	20
Pri Ora Ĵurnalo .....	2	Jen La Espero, revuo por la Sveda Esperanto-Federacio .....	22
Espe-Porko meditas .....	3	Jen Ponto – trans-Sunda gazeto .....	23
Savu la planedon! .....	3	Tago sen matena gazeto – perdita tago! .....	24
Jula festo ĉe Helfrid Karlsson en Torslanda 7 dec. ....	4	La memorgazeto (Minnenas Journal) .....	25
Por kristnaska festo 2019 .....	5	Kiu li estas? .....	26
La abio (Oh Tannenbaum) .....	6	Li provokis la potencon .....	26
Sankta Luĉia .....	6	Birdoj ĉe la okcidenta marbordo .....	27
Kristnaskon al vi gajegan .....	6	Pri la revuo "Västsahara" – la Okcidenta Saharo .....	28
Tintilar' .....	6	Pojken som levde med strutsar .....	29
Adventa krono de Germanio .....	7	Penseo .....	33
Inter mevoj kaj kolomboj sur placo de Gustavo Adolfo .....	8	"Kial estis azeno kaj bovo ĉe infanvartejo?" .....	35
Recepto el Veckan de 1904 .....	9	Germana revuo pri la 9a de novembro .....	36
Göra skillnad – poemo de Lisbeth J. ....	10	Turka Stelo .....	39
Gotenburgo .....	10	La frua historio de Esperanto en Britujo .....	39
Olga Tokarczuk el Pollando gajnis la Nobelpremion .....	11	Pri esperantolibroj – komentoj trovitaj en Twitter 27 novembro de Inga J. ....	40
Sten Svenonius, intervjuita de la Pola Radio .....	12	Inga trovis multajn proverbojn, i.a. la jenan .....	41
Kio okazas en la esperanto-klubo Toronto? .....	12	Saĝaj vortoj, trovitaj en la retpaĝo de Cecilia Wikström .....	42
Decembraj bildoj de Gdansko .....	13	Trollkarlen från Oz .....	42
Kristnaskaj spickukoj en Gdansko .....	14	Vapormaŝinaj antaŭvenintoj .....	43
De Kanado Lottie Ericson sendis mesaĝon ..	16	Je poemlegado ĉe Västsvenska Författarsällskapet 14 decembro .....	44
Franglish .....	16	Jarŝanĝajn gratulojn el antikva Samarkando! .....	46
Lerni la francan per Esperanto .....	16	Einar Dahls esperantominnen, forts .....	46
Orgenbruo en Gotenburgo .....	17	Mia plej kora Novjara bondeziro por 2020 ..	48
La "gazeta tago" en la gotenburga urba biblioteko 28/11 .....	18		
La gazeta laborejo – Tidningsverkstaden ....	19		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com, kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingeagerd.granat@telia.com. Fina paĝarango: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.



## Espe-Porko meditas



- ☆ *Bonan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron!*  
Dankon pro la jaro 2019!
- ☆ Ek de la januara numero en 2020 Ora Ĵurnalo estos membro de "Tidningsverkstan". Espereble ni tiam ekkonos aliajn retrevuojn kaj paperajn gazetojn. Ni jam scias iomete pri unu el ili: la revuon Västshara, kiu nun nur ekzistas rete.
- ☆ Espereble ankaŭ ĉi tiu numero estas varioplena. Ni raportas pri Pollando kun ĉiam bele dekoritaj urboj kaj pri la pola "stelulino" Olga Tokarczuk, kiu gajnis la Nobelpremion pri literaturo 2018... kaj ricevis ĝin en 2019. Dank al Monica ni ankaŭ spertas germanan tradicion per la "Adventa krono".
- ☆ Gazetoj, revuoj kaj ĵurnaloj havas grandan lokon en ĉi tiu numero. Ni iomete malrespekte miksas la tri vortojn. Ekz. Ora Ĵurnalo ja ne estas ĵurnalo, sed revuo, sed ni ŝatas la vorton "ĵurnalo". Ni ofte elektas la vorton "gazeto" por ĉiuj, ĉar estas praktike.
- ☆ Jen kelkaj svedaj gazetoj: La Espero, Ponto, GP, Minnenas Journal, Vagabond, Fåglar på Västskusten (Birdoj ĉe la okcidenta

marbordo) kaj Västshara. Ĉiuj iel havas gravecon por ni.

- ☆ Sekvas eksterlandaj gazetoj: de Jarmila Rysnarow'a ni ricevis rakonton el la ĉeĥa revuo "Informilo kun Antaŭen". Dank al Monica ni spertis "Deutsch Perfekt".
  - ☆ Tute nova estas la kontakto kun Turka Stelo kun la redaktoro Vasil Kadifeli. Pli pri ĝi en la venonta numero.
  - ☆ Kaj la ĉina poemgazeto rete "Penseo" reuzas poemojn de Kalejdoskop' – ĉar eble mankas kontribuoj de Nordio.
  - ☆ Teknikaj aferoj ĉiam estas interesaj. Lasse Granat skribas pri vapormaŝinoj.
  - ☆ Poemoj kaj kantoj troviĝas... kelkaj kun ligiloj al interreta muziko.
  - ☆ Ingegerd skribis bondezirojn por 2020 kaj ankaŭ rakonton pri la statuo de nia reĝo Gustavo la Dua Adolfo, kiu ĉiam dum novjara nokto depaŝas de sur sia alta piedestalo kaj promenas tra la stratoj de Gotenburgo. Folke tradukis.
- Kiam ni denove renkontiĝos estos 2020!

**Feliĉan Novan Jaron al vi ĉiuj!!!** /Siv



## Savu la planedon!

*El Facebook de Linda Andersson*

Rapida pentraĵo de la plej forta knabino de la mondo!  
Snabb målning på Världens starkaste tjej! 🌍👏🌸

La "bildo de la jaro" laŭ mi. /Siv

# Jula festo ĉe Helfrid Karlsson en Torslanda 7 dec.

La lastan Esperanto-Sabaton de 2019 dek kvin personoj ĉeestis en la festeno, al kiu ĉiu kontribuis.



*Helfrid*




*Juhaina, Ingegerd kaj Alma*



*Lasse kaj Bo*



*Lena kaj Christin*



*Inga*



*Alma, Inga, Monica, Siv, Helfrid*

# Por kristnaska festo 2019 /mel: Du ska få min gamla cykel

Se enua kaj trista ŝajnas viv'  
Jen festen'  
Kiam mankas vortoj eĉ en nia PIV  
jen festen'  
Kiam falĉe iras ĉio  
pliboniĝas certe io  
kaj fortiĝas mia mio  
jen festen'



Se vi sentas vin malforto kaj en febl'  
jen festen'  
se iritas vin la doma olda mebl'  
jen festen'  
se nur duonon batas koro  
kaj mankas la memoro  
jen la nuna ĝusta ĥoro:  
jen festen'!



Al Helfrid nun venis ĉiu hom'  
dank' al vi  
ĉiun jaron tre gastema estas dom'  
dank' al vi  
nur ni timas ke ludadoj..... (*Ingegerd estas spertulo pri tio*)  
malkaŝas ke mankadoj  
de esperantaj sciadoj  
restas nun, restas nun!..... (*Ne gravas, troviĝas kursoj!*)



**Ho venu, fidelaj**  
Ĝojaj, triumfantaj  
Venu, ho venu al Betlehem  
Jen Lin rigardu  
Reĝon de anĝeloj!

*Ho, venu Lin adori,  
Ho venu Lin adori,  
Ho venu Lin adori,  
Krist' la Sinjor'!*

Kantu, anĝeloj!  
Kantu triumfante;  
Kantu loĝantoj de supra Ĉiel'  
Gloro al Dio  
Ĉiopotenca!

*Ho, venu Lin adori,  
Ho venu Lin adori,  
Ho venu Lin adori,  
Krist' la Sinjor'!*

## La abio (Oh Tannenbaum)

//: Abio vi, abio vi, kun foliar' fidela! ://

Vi verdas ne nur en somer', sed eĉ dum vintra neĝveter'.  
Abio vi, abio vi, kun foliar' fidela.

//: Abio vi, abio vi, vin kreis Di' eterna; ://

Simbolo de la ama Hel', kiun Di' radias en Ĉiel'.  
Abio vi, abio vi, vin kreis Di' eterna.



## Sankta Luĉia

Peze la nokto nun,  
domojn alpaŝas  
teron forlasis sun'  
Ombroj ĝin kaŝas  
Tiam en nokta hor'  
pelos mallumon for  
Sankta Luĉia, sankta Luĉia

Dormas la nokt' en pac'  
Zumo flugila  
tra la silenta spac'  
vibras subtila.  
Sur nia sojlo sin  
montras la lum-reĝin'  
Sankta Luĉia, sankta Luĉia




## Kristnaskon al vi gajegan

Angle: *We Wish You a Merry Christmas*

Tradicia kanto el Anglio. Elangligis Liland Brajant ROS'.

Kristnaskon al vi gajegan, Kristnaskon al vi gajegan,  
Kristnaskon al vi gajegan deziras ni ja,  
Kun bona spertar'  
Dum tuta la jar':  
Al tuta la parencaro; nun adiaŭ, ĝis la!



## Tintilar' (Angle: Jingle Bells)

Glitante sur la neĝ' malantaŭ sol-ĉeval'  
Rapide iras ni sur kampo kaj en val';  
Sur la ĉevala vost' gajigas tintilar';  
Glitraĵo kaj kantado estas ĝojo sen kompar'.

*(Ho!) Tintilar', tintilar', tintu sur la voj';  
Rajdi en glitveturil', ho kia granda ĝoj-o!  
Tintilar', tintilar', tintu sur la voj';  
Rajdi en glitveturil', ho kia granda ĝoj'.*

Semajnon antaŭ nun glitraĵdi iris ni,  
Fraŭlino Fanjo Brajt kaj tutapude, mi.  
Sed nia ĉevalaĉon trafis malfeliĉ':  
Ĝi tiris nin sur neĝ-montet' kaj sekvis renversig'!

*(Ho!) Tintilar', tintilar', tintu sur la voj';  
Rajdi en glitveturil', ho kia granda ĝoj-o!  
Tintilar', tintilar', tintu sur la voj';  
Rajdi en glitveturil', ho kia granda ĝoj'.*

# Adventa krono de Germanio



**Adventskransen** – en tysk tradition då veckorna och dagarna blir mörka och allt kallare. /Monica

JOHANN HINRICH WICHERN var en protestantisk teolog och filantrop från Hamburg.

[https://sv.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Hinrich\\_Wichern](https://sv.wikipedia.org/wiki/Johann_Hinrich_Wichern)

Han skapade Adventskransen. Han inrättade och ledde ett hem för fattiga barn och ungdomar. Han samlade in pengar från de rika för sitt projekt.

I november 1839 hade han en idé om hur man skulle gestalta adventsfirandet.

Han tog ett stort vagnshjul av trä och satte fast på det 28 ljus. Detta hjul hängde han i bönesalen i barnhemmet.

Barnen gillade idén. För måndag till lördag sattes små röda ljus på hjulet och för var söndag i advent placerades tjockare vita ljus.

Först 1861 blir kransen dekorerad med grankvistar.

Från det protestantiska Hamburg sprids idén och blir populär i hela Tyskland, (samt även i Danmark och Norge

<https://no.wikipedia.org/wiki/Adventskrans>)

**Adventa krono** – Germana tradicio kiam la semajnoj kaj tagoj malheliĝas kaj malvarmiĝas. /Monica

JOHANN HINRICH WICHERN estis protestanta teologo kaj filantropo el Hamburgo.

Li kreis la Adventan kandelkronon. Li starigis kaj gvidis hejmon por malriĉaj infanoj kaj gejunuloj. Li kolektis monon de la riĉuloj por sia projekto.

En novembro 1839 li ekhavis ideon kiel festi adventon. Li prenis grandan lignan vagonan radon kaj sur ĝin metis 28 kandelojn.

Li pendigis ĉi tiun radon en la preĝĉambro de la orfejo.

La infanoj ŝatis la ideon. Por lundo ĝis sabato oni metis malgrandajn ruĝajn kandelojn sur la radon, kaj je ĉiu dimanĉo en advento estis metita dika blanka kandelajo.

Nur ekde 1861 la krono estis dekorita per verdaj piceaj branĉetoj.

De protestanta Hamburgo, la ideo disvastiĝis kaj populariĝis tra Germanio.

En 1925, ĉi tiu adventa krono venas al Kolonjo, kaj la unuan fojon ĝi estas starigita

1925 kommer denna krans till Köln och för första gången sätts den upp i en katolsk kyrka – i en variant med grangrönt och bara fyra ljus, denna version blir en norm i Tyskland, Österrike och Schweiz.

Adventskransens symbolik tolkas olika. Den runda formen symboliserar för den troende det eviga livet, solen, jorden eller Gud. Den gröna kvisten står för hoppet.

Ljusen symboliserar det ljus i världen, som kristna kallar Jesus.

Adventskransar står i dag i många vardagsrum. Den hittills största adventskransen med sina fyra ljus stod dock 2017 i den schweiziska byn Mosnang <https://sv.wikipedia.org/wiki/Mosnang> Den bestod av 300 kubikmeter trä och det behövdes 300 invånare från byn för denna väldiga konstruktion. Diametern på kransen var 121,60 meter. Ljusen var dock inte traditionella utan de var alla elektriska.

en katolika preĝejo – en varianta kun ĉiamverdaj piceaj branĉetoj kaj nur kvar kandeloj.

Ĉi tiu versio fariĝas normo en Germanio, Aŭstrio kaj Svislando.

La simboleco de la Adventa krono estas interpretata diversmaniere. La ronda formo simbolas por la kredanto eternan vivon, la sunon, la teron, Dion. La verda branĉeto reprezentas la esperon.

La kandeloj simbolas la lumon en la mondo, kiun kristanoj nomas Jesuon.

Adventaj kronoj staras hodiaŭ en multaj loĝejoj. Sed la plej granda krono ĝis nun kun siaj nur kvar kandeloj staris en 2017 en la svisa vilaĝo Mosnang. Ĝi konsistis el 300 kubaj metroj da ligno. Estis bezonata 300 loĝantoj de la vilaĝo por fari ĉi tiun grandegan konstruadon. La diametro de la krono estis 121,60 metroj. La lumoj ne estis tradiciaj kandeloj sed ili estis ĉiuj elektraj.

## Inter mevoj kaj kolomboj sur placo de Gustavo Adolfo

ESTAS TUTE ORDINARA griznuba tago meze de la Gotenburga centro. Johanna staras kiel kutime en la Fonta parko rigardante en la direkto al Placo de Gustavo Adolfo. La grizaj mevoj kriadas super la Rivero, kaj la kolomboj promenas fiere sur la placo serĉante inter noktaj ruboj postlasitaj. Jen kaj jen iu mevo faras plonĝon kontraŭ frandaĵo observita de el la aero.

En la palacoj de la Potenco ariĝis homoj por siaj tagaj okupoj. Kiamaniere la realo estu plimalfaciligata por la loĝantoj de Gotenburgo, estas delikata tasko por decidi kaj plenumi. Impostoj punaj kaj monoj nesufiĉaj por la propraj agadoj kutimas ĉiam esti efikaj rimedoj por "faciligi" la vivon de ordinaruloj. En tia kulturo Ĥaoso vere estas najbaro de Dio.

Gustavo la Dua Adolfo staras sur sia piedestalo meze sur la placo rigardante la aĉaĵon. Unufoje ĉiujare li kutimas depaŝi de sur sia alta piedestalo. Tiam li sin





vestas per la glora potenco kaj aŭtoritato de antikvaj epokoj kaj rakontas, kion li vidas en la urbo iam fondita de li.

Tio kutime okazas en la Novjara nokto, kiam la ĉielo koloriĝas kaj tondras per sennombraj artfajraĵoj, io, kio memorigas lin pri la batalo ĉe Lützen, kie li iam mortfalis, kaj kie la konfuzo estis grandega.

Gustavo Adolfo iradas sola laŭ la stratoj de Gotenburgo. Forpasis ankoraŭ unu jaro, kaj li sentas sopiron reiri al la batalkampoj. Tie la bataloj estis veraj, ne duonsolvoj, kiajn li spertas ĉiutage en la nuntempa Gotenburgo. Malrapide li iradas laŭ Haringa Strato.

Jen generacio sen scioj pri la historio! Baldaŭ, certe, ili malkonstruos ĉion, kio memorigas pri mi kaj la kulturo kaj historio gotenburgaj. Ekde sia gvatposteno li ekvidis, kiel tiuj, kiuj responsas por la komunumo, fuŝis, translokis kaj detruis amason da antikvaj monumentoj.

Tio, kio anstataŭiĝis, estas senfantazia kaj pli griza ol la nebuloj de Lützen.

Ne estas agrablaj la pensoj, kiujn portas la maljuna reĝo ĉirkaŭirante dum la Novjara nokto.

La fortikaĵojn ĉirkaŭ la urbo ja malkonstruis la freneza Gustavo la Kvara, antaŭ ol li estis detronigita kaj ekzilita en centran Eŭropon. Tamen restas kelkaj partoj. Sed mi estas kontentega, ke ili faris mapon de la malnova Gotenburgo per la pavimeroj de la placo. Tio

ja iomete faciligas trovi la vojon, nun, kiam ili ekstreme fuŝis la urbon!

Tamen: de mia alta pozicio mi vidis, ke ili iam kaj tiam starigas budojn kaj barakojn super la kulturhistorian mapon. Tiaĵoj rezultigus "ĝismortan fortikaĵon" miatempe. Ĉu la regantoj de Gotenburgo tiom freneziĝis?

Mi komprenis, ke la nobla projekto "Hindia ŝipo Götheborg" estas minacata! Kiel eblas? Tiu belega ŝipo! Krome ŝipo, kiu ne renversiĝas tuj kiam ĝi debordiĝas. Tiam ŝipon ni estu posedintaj miatempe! Tiam ni vere venkus niajn batalojn!

Aŭdu! La preĝeja sonorilo de la Christina-paroĥo batas la duan kaj duonon, mi kredas. Mi rapidu al mia posteno.

La ensorĉo de la Novjara nokto estas ĉesinta, kaj Gustavo la Dua Adolfo ree staras sur sia fundamento. Vere li estas nura kopio. La unua statuo dronis, kaj la germanoj mem levis ĝin kaj metis ĝin sur placon en Germanio, ĝis Adolfo Hitler ĝin fandis kaj uzis ĝin por fari kuglojn dum la Dua mondmilito.

Gustavo Adolfo la Kopio malkontentas pri la aŭtoritatoj de Gotenburgo. Li sentas, ke li fariĝas pli kaj pli maljuna. Eble lin trafos la sama destino kiel lian antaŭulon. Li estas milde dirite skeptika.

*Ingegerd*

La stulteco regas la urbon, kiun li iam fondis!  
/Ingegerd

## Recepto el *Veckan* de 1904

### OVOLAKTO KUN ŜAŬMO

(Por 4 personoj.) 1 ½ litro da lakto, 2 ovojn, sukero, salo, la ŝelo de triona citrono, raspita.

Apartigu la ovoflavojn disde la ovoblankoj, metu la ovoflavojn en la supujon, kaj batu la ovoblankojn ĝis firma ŝaŭmo. Formu bulkojn el la ovoblanko kaj metu en la hejtigitan

lakton. Certigu ke la lakto ne ekbolas. Ellevu la bulkojn post kelkaj minutoj per truita ĉerpkulero kaj metu sur harblutilon (hårsikt). Raspu la citronŝelon en la lakton, prove gustumu kaj verŝu la lakton sur la ovoflavojn dum forta kirlado. Enmetu la bulkojn, superŝutu per sukero kaj surtabligu.

# Göra skillnad

poemo de Lisbeth J. membro de VFS –

Västsvenska Författarsällskapet – La Okcidenta Verkista Societo.

*Se iu svedo volus traduki la poemon en esperanton – bonvolu!!*

## Göra skillnad (Fari diferencon)

Sluta med ert tjat  
om hur allting bör vara  
Världen blöder  
delas i två  
De som har  
De som dör  
Gör något då



Ni maktens män  
med smutsiga händer  
Ni som äter vid bord  
med brutna servetter  
Ser ni inte  
De som har  
De som dör  
Så gör något då

Landet blir aldrig rikare än nu  
Allt ni har är råd  
Tiden bara flyr  
även maktens män får vita hår  
När dagen gryr är vi alla som små barn  
Hör ni inte  
De som har  
De som dör  
Så gör något då

Vi har alla händer  
att fatta och samlas kring  
Vi från alla olika länder  
som samsas en kort tid  
Väntar på våren  
som barnen på julafton  
Nu gör vi skillnad  
Låt oss göra skillnad.

*Lisbeth H. Johansson*

# Gotenburgo

Jam en 2010 Inga, Andreas kaj Siv trovis ĉi tiun kanton pri Gotenburgo je la melodio "Waterloo". Ni aŭskultis la kantiston kaj post iu diskuto ni konsentis ke la teksto estu la jena:



Kiam mi vidis vin  
mi sentis min sorĉita  
kaj nun mi volas resti nur kun vi  
por ĉiam, kredu min

Mi venis do por la kongres'  
sed nun estas amo promes'

Gotenburg' kongresi mi venis, fiera urb'  
Gotenburg' estas kaptita nun mia kor'  
Gotenburg' estas la urbo de mia am'  
Gotenburg, venkis vi simple per via ĉarm'

Gotenburg', venkis vi simple per via ĉarm'

lam mi hejmen venis  
mi sentis min perdita  
kaj ĵus mi serĉas vin  
mi restis ensorĉita, kredu min!  
mi pensas al mia promes'  
kaj aŭdas la amo sen ĉes'

Gotenburg' .....

La demando ne estas kial  
sed kiam revenos mi al

Gotenburg' venkita mi estas kaj gajnis mi  
Gotenburg' estas la urbo de mia am'  
Gotenburg' venkis vi simple per via ĉarm'

Gotenburg' estas la urbo de mia am'  
Gotenburg' venkis vi simple per via ĉarm'

*Ralph Glomp – Gotenburg' – YouTube*  
<https://www.youtube.com/watch?v=-zyYQX5cr0k>

## Olga Tokarczuk el Pollando gajnis la Nobelpremion

pri literaturo de 2018 kaj **Peter Handke** gajnis la saman premion de 2019. Ambaŭ premioj estis donitaj ĉi tiun jaron la 10an de decembro.



En sia "Nobel-prelego" Olga Tokarczuk streĉis la grandan rolon kaj povon de la literaturo.

Por ŝi la belarto temas pri la mondo, kiu ĉiam aperas kiel unueco. Romanoj ne donas fakton sed sperton. Ŝi citis Aristotelon: "Fikcio ĉiam enhavas specon de vero".

Tamen nur malmultaj samlandanoj povis aŭskulti ŝin. La pola ŝtata TVP ne sendis la premian ceremonion laŭ la gazeto Dagens Nyheter. Ek de la konservativa naciista partio PIS (Leĝo kaj justeco) formis la registaron en 2015, la tono en la TV-entrepreno TVP ŝanĝis al pli da porregistaro kaj kontrolado.

Samtempe Olga Tokarczuk dum pluraj jaroj iritis naciistojn per publike senglorifi la polan historiografion. Pli frue la pola registaro forprenis ŝin de la listo de kulturlaborantoj, kiuj rajtas ŝtatan apogon por lanĉado eksterlande.

En Pollando estis en 2014 eldonita ŝia "Jakobaj libroj" kun multegaj paĝoj. Malgraŭ ke Olga Tokarczuk ne havas judan devenon, ŝi kaptis la filozofian raviĝon, la judan mistikon kaj la homan malesperon.

Personoj kun katolikaj kaj naciistaj preferoj koleriĝis, aparte kiam la verkistino esprimis la polan kunkulpon pri la murdoj de judoj.

**Lastatempe estis *du* polaj verkistinoj kiuj gajnis la Nobel-Premion. Unue Wisława Szymborska kaj nun Olga Tokarczuk. Gratulon Pollando! Mi nepre legu iun verkon de Olga Tokarczuk. /Siv**



*Olga Tokarczuk, en 2018.*

*Naskita 29 januaro 1962 en Sulechów, Pollando.*

*Profesio Psikologo, verkisto, poeto.*

*Elstaraj verkoj en sveda trad. Gammeltida och andra tider (1996)*

*Löparna (2007)*

*Elstaraj premioj Man Booker International Prize (2018)*

*La Nobelpremio pri literaturo (2018)*

# Sten Svenonius, intervjuita de la Pola Radio

Inga Johansson aŭdis ke en la Pola Radio estas bona intervjuo kun Sten Svenonius. Aŭskultu ankaŭ vi!

La parto en kiu ni aŭdas Sten komenciĝas post 16,41 minutoj. La tuta programo daŭras ĉirkaŭ 30 minutojn.



[http://pola-retradio.org/wp-content/uploads/2019/11/RetRadio\\_29.11.2019\\_915\\_vendredo.mp3](http://pola-retradio.org/wp-content/uploads/2019/11/RetRadio_29.11.2019_915_vendredo.mp3)

<https://www.youtube.com/watch?v=c7OJRUhCH2A>

## Kio okazas en la esperanto-klubo Torento?

La prezidantino de la pola triurba esperanto-societo Gdansk – Sopot – Gdynia, Paulina Jot, informas nin.



Kara Siv!

Kiel mi promesis mi skribas – kio nova ĉe Torentanoj:

Antaŭ la somero ni komencis ĉiumonatan renkontiĝon en la loka biblioteko nomata "esperanta babilado" kiun ni ankaŭ reklamis en duolingo. Ni laboris pri la novaj retpaĝoj: sur fejsbuko kaj pri la oficiala retpaĝo de la asocio.

Dank al nia interreta agado trafis al ni Piotr – juna kaj tre sperta lingvisto. Li lernis Esperanton mem kaj en nia klubo la unuan fojon en lia vivo parolis esperante kun vivanta persono. Krome aŭ ĉefe li interesiĝas pri la mazura lingvo. Ĝi estis preskaŭ

forgesita kaj li kunlaboras kun aliaj ŝatantoj de la Mazura por ke ĝin protekti kaj popularigi. Lastatempe Piotr preparis prezentadon por la Torentanoj, tre interesan kaj profesian, kaj kompreneble en Esperanto.

Ligilo al lia verko sube.\*

La 8-an de decembro en Gdynia okazos malfermo de renovigita piedira zono por loĝantoj de kvartalo Chylonia – ĉe la strato Zamenhofska. Tie oni kreis amikan spacon kun benkoj, ludejoj, urba verdaĵo. Interesa estas, ke aperis informoj pri Ludoviko kaj subĉiela vortludo en Esperanto.

Ni jam pripensas la ĉefan temon por venonta "Esperanto sur la strando". Ni okupiĝos ĉi-

foje pri paganismo. Tio estas preskaŭ tute forgesita temo, ŝajnas esti ege interesa. Mi kompreneble informos vin pri la evento pli poste.

Ĉion bonan al la Gotenburganoj!

*Paulina*

\*) <https://sites.google.com/prod/view/triurbo/eo-cxefpagxo/pri-ni/ekspozicioj/2019> mazuroj

## Decembraj bildoj de Gdansko

Mi demandis al Elwira Twardowska ĉu ŝi povus sendi bildojn pri ŝia urbo. Gdansko estas urbo kun riĉaj tradicioj. Ŝi fine donas al ni recepton pri spickukoj.





## Kristnaskaj spickukoj en Gdansko

Ĉi jare en Gdansko ni komencis festadon de Kristnasko jam de la tago de Sankta Katarino.

En Pollando la plej popularaj spickukoj estas nomataj, "katarinetoj" kaj la spickuka procesio malfermis sabate la kristnaskan foiron.

Gdansko havas longan spickukan tradicion. Ĉi tien venadis ŝipoj de oriento kun diversaj spicaĵoj – ĉi tie oni vendadis cinamon,

vanilon, zingibron, kariofilon kaj aliajn aromajn varojn.

La spicaĵoj estis multekosta varo kaj tre facile de gdanska malseka vetero ĝi povis malboniĝi. Neniu nun memoras, kiu elpensis konservadon de spicaĵoj, sed tio estis la komenco de spickuka tradicio. La spicaĵojn oni miksis kun mielo en bareloj kaj tiel preparitan miksaĵon sekure eblis havi en la kelo. La spica miksaĵo estis tre valora.

En malnovaj bakistaj libroj oni trovis noton, ke iu riĉa gdanskano donis spicplenan barelon, kiel doto al sia filino.

Nun spickukoj estas bakataj decembre. Ne eblas eĉ imagi kristnaskan festadon sen

aromo de bakataj spickukoj. Spickukoj nun estas tre diversaj, bakataj laŭ familiaj tradiciaj receptoj, bakataj kaj ornamataj de tuta familio. Ofte hejme faritaj spickukoj ornamas kristnaskarbeton. /Elwira



**Kaj – Sankta Luĉio estas celebrata ne nur en Nordio, sed ankaŭ diversloke ekz. en Pollando.**



# De Kanado Lottie Ericson sendis mesaĝon

*pri du gravaj aferoj*

*1) ke la 15an de decembro estas la datreveno de la naskiĝtago de L.L. Zamenhof*

*2) ke venontan jaron estos UK en Montrealo*



*Ŝi kunigis la du eventojn en unu kanto. Jen ŝia skribo:*

La eta Esperanto Grupo celebris la naskiĝtagon de Zamenhof en la hejmo de Lottie Ericson. Ni kantis kristnaskajn kantojn kaj ankaŭ kantojn honorante Zamenhof. Kaj por sendi mesaĝon pri la 105a Universala Kongreso ni laŭte kantis

**Venu fidelaj! Venu al l'kongreso!**

**Venu, ho venu, en harmoni'!**

**Kun la vortaro**

## Franglish

Cecilia Wikström (L) publikigis la jenan lingvomikson en Twitter. Do, ne timu uzi du lingvojn samtempe! →  
Cerbotrejnado! /Siv



**Lerni la  
francan per  
Esperanto**



Inga trovis jenan ligilon:

<https://youtu.be/pqXjPG5SLus>

Mi provis kaj ŝatas la kurson – ĉefe temas pri frazoj. /Siv

**Flugu trans la maro!**

**Vizitu Montrealo!**

**Vizitu Montrealo!**

**Vizitu Montrealo!**

**En Ka-a-nada!**

**Bonan Kristnaskon kaj**

**Bonan Novan Jaron al ĉiuj!**

Amike,

Lottie

Dankon Lottie pro via letero! /Siv

## Le Franglish!

You Can't Read This Article Si T'es Pas Bilingue  
(English & Français)

Being bilingual est parmi the best pleasures dans le monde entier. Think about it pour un instant. You can utiliser deux different languages en même temps in a such a way that makes ton cerveau wants to exploser from the speed par la quelle it switches from one langue to l'autre but still tu peux do it and ressentir spécial(e) at the same time, et c'est pour ça you are unique. le fact that tu peux lire this article without stopping to think est un talent très few people have. La majorité of people struggle to lire juste in one single language, but what you are doing maintenant est un signe of absolute genius. Reading a très complicated texte in two langues différentes seamlessly makes you un(e) nerd et someone qui trouve joy in languages. Reading cet article must have given your brain a nice little workout.

That's why you should le partager avec vos amis.



# Orgenbruo en Gotenburgo

## Orgelbrus i Göteborg



Se vi sidas en aŭtovico sur la granda aŭtovojo dum la horoj de kulmino, matene aŭ posttagmeze, samnivele kun la ejo de "Ullevi" proksime de "Mariapreĝejo", bonvolu pensi pri la adreso Dämmevägen 19, kiu ne ekzistas hodiaŭ. Tie estis la loko, kie Johannes Magnusson en la jaro 1888 fondis la grandan orgenfabrikon.

La laboro fari grandajn preĝejajn orgenojn daŭris dum tri generacioj. La filo Anders transprenis la negocon post Johannes kaj la nepo Stig transprenis post sia patro Anders. En la fino de 1970 la orgena fabriko bankrotis kaj estis vendita.

Hodiaŭ A. Magnusson Orgena fabriko situas en Veddige.

Dum la kristnaska periodo mi vere volas aŭskulti "Kvieta nokto" ludita sur granda orgeno kaj mi scias kie mi trovas grandan orgenon kun pluraj orgentuboj, nome en "Masthuggskyrkan", Gotenburgo.

Tie, unu el la plej imponaj orgenoj troviĝas jam de multaj jaroj. Ĝi inaŭguriĝis en 1914 de Gustaf V mem, la reĝo de Svedio. Ankaŭ en aliaj preĝejoj, en kaj ĉirkaŭ Gotenburgo, troviĝas orgenoj de la fabriko de A.Magnusson, ekz. en Christine-preĝejo, en Skår-preĝejo kaj en Utby-preĝejo.

En la preĝejo de Angered, "Angereds kyrka", troviĝas orgeno de nova konstruanto (nun en Veddige). En aliaj partoj de la mondo oni aŭdas la sonon de tuboj kiuj estis faritaj en la orgena fabriko A.Magnusson je la adreso, kiu ne plu troviĝas.

"Gårdamotet" en Gotenburgo estis vivanta urba regiono kun loĝejoj, butikoj kaj mekanikaj laborejoj ktp. Sed post 1967 la trafika infero vanigis tiun lokon por homaj vivoj. La bruo estas tro laŭta kaj la belega sono de A.Magnusson orgena fabriko malaperis. /Ingegerd

# La "gazeta tago" en la gotenburga urba biblioteko 28/11

**K** som  
i Kulturtidskrifter

Moderator:  
Elisabeth  
Lundgren

## TIDSKRIFTSDAG 28 NOVEMBER PLATS: Trappscenen på Stadsbiblioteket i Göteborg PROGRAM



16.10–16.40

### TA TÅGET!

PER J ANDERSSON  
författare, journalist  
och en av grundarna  
till tidskriften  
**VAGABOND** talar om  
tågresande genom  
historien samtiden  
och framtiden.



Tidskriftsdagen är ett samarbete mellan  
Stadsbiblioteket Göteborg och Tidskrifts-  
verket och stöds av Kulturrådet.  
Funderar du på att starta en tidskrift?  
Hör av dig till: [tw@tidskriftsverkstaden.se](mailto:tw@tidskriftsverkstaden.se)

16.50–17.30

### TIDSKRIFTS- VERKSTAN



Tidskriftsverkstans  
ordförande  
**CHRISTER  
WIGERFELT**  
presenterar  
föreningen  
och sen får två  
medlemstidskrifter  
ordet.

**KULTUR-  
OPPORTUNISTEN**  
– **PETRONELLA**  
**SIMONSBÄCKA** presenterar sin nystartade  
tidskrift.



17.40–18.00

### DN I GÖTEBORG. VARFÖR?

Därför  
etablerar DN  
en Göteborgs-  
redaktion.  
**ERIK ASK**, chef  
DN Göteborg  
berättar.



18.15–19.30

### BOSTADSKRIS

Varför har det blivit så dyrt att bo och varför  
är det så ont om bostäder?



Dokumentärfilmaren **FREDRIK GERTENS** nya  
film **PUSH** har blivit nytt liv i bostadsfrågan.  
Ett utforskande samtal om bostäder och  
bostadspolitik. Vad säger forskningen,  
Hyresgästföreningen och aktivisterna?  
Samtalet inleds med några filmsekvenser från  
filmen Push.

Medverkande:

**OVE SERNHED**, professor i  
socialt arbete, aktuell med boken  
"När betongen råtar sin rygg".




**CHRISTINA ABRAHAMSSON**,  
ordförande Hyresgästföreningen  
Centrum, Göteborg



**DANIEL CARLENFORS**, aktivist  
och en av grundarna till  
föreningen "Alla ska kunna bo  
kvar" och Pennypodden.



Samtalsledare **ELISABETH  
LUNDGREN**.



La unua numero.

Per Andersson rakontis pri la historio de trajnoj. Inter Manchester kaj Liverpool iris la unua trajno jam en 1830. Bedaŭrinde okazis morta akcidento la unuan tagon, kaj la reputacio de trajnoj fariĝis malbona. La trajnoj komence ĉefe transportis karbon kaj nur se estis malplena vagono, personoj estis transportitaj. Pli kaj pli la vagonoj fariĝis pli komfortaj, sed dum multaj jaroj oni ne povis iri de unu kupeo al alia. Se oni malŝatis la

Dum unu el la plej pluvaj tagoj mi vizitis la urban bibliotekon por lerni pri la funkcio de retgazetoj. Kelkaj gazetoj troviĝas kaj rete kaj papere. Sub la organizo de Tidskriftsverkstaden – (la gazeta laborejo) oni povas trovi gazetojn pri kulturo kaj publikaj aferoj, malfermitajn al ĉiuj.

Unue **Vagabond** (la Vagabondo), la plej granda sveda vojaĝgazeto, estis prezentita de Per Andersson, unu el la fondintoj. La unua numero aperis en 1987.



Libro verkita de Per Andersson.

kunvojaĝantojn oni devis atendi ĝis la trajno haltis, por ŝanĝi kupeon.

Pli kaj pli landoj konstruis relojn. Daŭris longe ĝis la tempoj de la horaroj fariĝis normigitaj. Diversaj trajnkompanioj mem decidis pri la tempoj. Tial povis esti ses horloĝoj en unu stacidomo montrantaj diversajn horojn.

En 1869 iris trajno de la Pacifika Oceano ĝis la Atlantiko. Multaj antaŭjuĝoj troviĝis, ekz. "La

rapideco povas kaŭzi difektojn en la cerbon”, ”la skuo de la trajno povas stimuli seksemon”, ”trajnoj povas esti loko por murdoj” (Agatha Christie: La murdo en la Orienta ekspreso). En la distanco Parizo – Istanbulo trajnoj havis luksajn kupeojn kaj



*Jen bildo de la prezentado de Per Johansson.*

salonojn. La Orienta ekspreso iris ek de 1883 ĝis 1977.

En 1939 la sveda ŝtato aĉetis la privatajn fervojojn por efektiviigi la trajnvojaĝon. Sed la aŭto pli kaj pli minacis la trajnvojaĝon. En 1965 la poeto Sture Axelsson verkis la poemon: ”Ĉe malestablita stacidomo”.

Trajnvaganto, tre populara en mia juneco, nun ankoraŭ funkcias en orienta Eŭropo. Oni povas forlasi la trajnon laŭvole kaj eniri aliajn trajnon kiam oni volus. En okcidenta Eŭropo oni devas aboni sidlokon kaj ne povas spontane vojaĝi.

En Hindio 12 600 trajnoj iras tagnokte. Paradizo por trajnamantoj laŭ Per Andersson.

Per Andersson rakontis multe pli kaj montris multajn bildojn. Vi povas legi pli en lia libro ”Ta taĝet!” (Iru per trajno!) eldonita en 2019 – sed nur en la sveda bedaŭrinde. Li gvidas nin ”sur la trakoj” tra la historio, tra la nuna tempo kaj – al la estonteco. Estas persona libro, sed samtempe, historia odiseado, libro pri la klimato kaj admono ne ĉesi vojaĝi – nur vojaĝi kun prizorgo pri la klimato. /Siv

## La gazeta laborejo – Tidningsverkstaden

**Christer Wigerfelt, la inicianto de Tidningsverksta’n – prelegis dum la Tago de gazetoj en la urba biblioteko de Gotenburgo. La Gazeta Laborejo havas apogon de Kulturrådet kaj Västra Götalandsregionen. Ĝi ankaŭ troviĝas en Stokholmo, Malmö kaj Luleå.**

Ek de 1999 la Gazeta laborejo troviĝas en Lagerhuset kune kun kelkaj el la kulturgazetoj de Gotenburgo ekz: Ord & Bild, Paletten, Zenit kaj Glänta.

Tidningsverkstaden apogas kaj povas evoluigi kulturajn gazetojn – nun 13 paperajn kaj 6 retgazetojn. Tre gravas merkato. Oni aranĝas ekspoziciojn, seminariojn kaj foje oni eldonas antologiojn. Hodiaŭ



Tidningsverkstaden prezentis du gazetojn. Västsahara kaj Kulturoportunisten. Pri Västsahara ni scios pli la 18an de januaro,

kiam ties redaktoro Lena Thunberg vizitos nian esperantoklubon en Redbergsskolan je 10h30. Estu bonvena! Legu pli en [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)! Pri Tidningsverkstaden, legu pli en [http://www.tidskriftsverkstaden.se/?page\\_id=346](http://www.tidskriftsverkstaden.se/?page_id=346)

DN – Dagens Nyheter – oni kutime klasifikas kiel stokholman gazeton, malgraŭ la intenco de la redaktoroj, kiuj volas eldoni gazeton por tuta Svedio.

La nombro de paperaj gazetoj malkreskas. DN nun havas novan centron en Gotenburgo kaj esperas ke homoj volus pagi por retgazeton kun altvolora enhavo. /Siv



*Sur la bildo: Erik Ask, redaktoro de DN, Gotenburgo.*

## Bakom kulisserna då Ora Ĵurnalo produceras

Gruppen består av Ingegerd Granat (initiativtagare till projektet), Andreas Nordström, Inga Johansson, Birgitta Anevik och Siv Burell. Sporadiskt engagerar vi också andra.

**Siv Burell:** Det är ett nöje att vara medlem i en grupp, som alltsedan november 2017 har lyckats ge ut nättidningen Ora Ĵurnalo varje månad. På sommaren har vi ett dubbelnummer för juni – juli. Nummer 24, som du just läser, avslutar 2019.

Varje gång jag börjar med ett nytt nummer tänker jag: – Vad kan jag bidra med? Men genast kommer nästa tanke: – Stopp Siv! – det är jättebra om många bidrar.

Vi kan inte ge arvode. Alla arbetar gratis. Ändå är det många personer, som (enligt mig) glatt bidrar med texter och bilder från sin region, sitt land, med sina erfarenheter och sina upplevelser. Då många bidrar, underlättas vårt arbete.

När jag får en artikel, ändrar jag genast typsnittet till Calibri, för att texterna ska bli lättlästa och för att jag ska få känslan av enhetlighet. Övriga tekniska detaljer

överlåter jag till Andreas. Ofta har jag problem med bilder, som inte vill fastna, där jag vill ha dem.

Jag hoppas att Ora Ĵurnalo speglar vår tid och dess kultur och ska vara intressant för läsare nu och i framtiden. I Ora Ĵurnalo dokumenterar vi aktiviteter i esperantoklubben och på andra platser. Genom tidningen kan vi ge samma information till många samtidigt. Många texter kan också fungera som kursmaterial.

Mitt alter-ego är Espe-Porko på sidan tre. Där kan jag kort informera, kommentera och filosofera om innehållet i den aktuella tidningen.

Då vi arbetar med tidningen sitter vi i våra egna hem, med våra egna datorer, med våra egna problem och med våra egna lösningar. Men hela innehållet läses sedan av alla i gruppen.

Ora Ĵurnalo har sin bas i Göteborgs Esperantoförening, men är öppen för "hela världen".

**Ingegerd Granat:** Varför en nättidning som "OĴ"? Ja, idén kom upp när jag deltog i ett möte med riksföreningen där det framfördes att "ni gör ju så mycket i Göteborgs-klubben, men ingenstans får vi veta var eller när – och sedan hur det gick". Vid den tiden var inte riksföreningens hemsida lätt och kanske inte heller rätta platsen för vår verksamhet. Vi inom hela Esperantorörelsen blir också ofta kommenterade med till exempel "finns det än, det gamla språket, det är det väl ingen som kan?" eller rent av "det pratade min mormors mor"...

Och visst är somligt inom rörelsen föråldrat och gulnat, men idén om ett "språk för alla" blir ju inte sämre för det. Så varför inte vara riktigt modern i vårt lokala område, Göteborg.

Jag fick gehör för en klubbtidning på nätet, där vi delar med oss av den kultur som finns i staden. Liksom Esperantospråket skulle det vara en tidning med något för alla här i Göteborg och ute i övriga världen.

Det var också tänkt att utveckla språket inom klubben och det är det många som har gjort. Det är också en strävan att materialet skall vara användbart vid uppläsningar och vid träffar av olika slag.

Min återkommande favorit i OĴ är den lilla grisen Espeporko som "meditas". Det är ett oerhört lustfyllt arbete med varje nummer tycker jag. Det har blivit som ett vitaminpiller för hela föreningen i Göteborg, fast man behöver inte vara vare sig esperantist eller Göteborgare för att komma till tals.

Vi välkomnar alla att läsa och tycka och gå på kurser!

